

## **Regularo pri elekto de Honoraj Membroj de ILEI**

*Enkonduka noto: "Skriba formo" signifas aŭ paperan aŭ elektronikan dokumenton.*

1. La Proponoj nomi Honoran Membron de ILEI devas atingi la sekretarion en skriba formo ĝis la 31-a de marto ĉiujare.
2. La propono devas esti subtenata de minimume tri ILEI-sekcioj.
3. La Estraro rajtas sendepende de la sekcioj fari proponojn.
4. Ĉiu propono devas enhavi la skriban konsenton de la koncernato. Kaze de forpasinto, la konsento estu de kompetenta heredanto.
5. Propono por honorigo de forpasinto devas alveni ene de du jaroj de la forpaso.
6. Ĉiu propono devas havi biografian priskribon de la agado de la proponato kune kun motivigo deflanke de la proponantoj.
7. La Estraro pristudas proponojn kaj faras rekomendojn al la Komitato, kiu decidas dum ĉeesta kunsido.
8. La honorato aŭ la kompetenta heredanto ricevas diplomon pri la Honora Membreco.
9. La listo de la Honoraj Membroj de ILEI (kun la indikoj de la kompleta nomo, devenlando kaj jaro de la honorigo) estas publika kaj troveblas en la oficiala retpaĝaro de ILEI.

La regularo estis laste modifita per reta voĉdonono en junio 2011 kaj konfirmita de la komitato en Kopenhago en julio 2011.

Modifproponoj aperis en 2019, estis akceptitaj per reta voĉdono en septembro 2019 kaj estos konfirmitaj en Kebekurbo en julio 2020.